(4671)

# GENERALITAT DE CATALUNYA

PRESIDÈNCIA

COMISSARIAT DE PROPAGANDA

Avinguda 14 d'Abril, 442 bis : BARCELONA : Telèfon 82215

1008
1.11.1908

## COMUNICAT DE PREMSA

ESPERANTO - ELDONO. Nº. 11. Barcelona, 24/III, 1937.

### ĈIU LANDO HAVAS SIAN FRANCO'N.

Pri la vera karaktero de hispana milito ekzistas nek en Hispanujo mem, nek en eksterlando la malmulta dubo; la milito en Hispanujo en ĉiu okazo radikale diferencas de iu simpla militistribelo. Tamen, la hispana milito komencis per la militistribelo, per la interna ribelo de armeo, se oni precize opinias pri la ekstera ŝajno. Sed, eĉ tiu ekstera ŝajno jam je la unua komenco de la milito forpasis....




VON FRANCO JAM KVIN FOJE FALETIS ĈE MADRIDO........

Estis asertate, ke la ribeligo de granda parto de hispana armeo koncernis unu »nacian movadon«, kiu volis eviti la »minacantan bolŝevismon« kaj la »anarkistan ĥaoson«. Koncernis la defendon de tradecio kontraŭ la bolŝevigo de la lando. Al ĉiuj, kiuj en bona kredo starigis en la flanko de la militista ribelo, servis tiu argumentado kiel fundamenta bazo de konvinko. Sed, precipe ĝi servis al tiuj faŝistaj landoj, kiuj pli aŭ malpli malkaŝe intervenis kaj intervenas en Hispanujo por la utiligo de Franco. Al tiuj landoj oni neniel povas akuzi je malbona kredo.... La faŝistaj ŝtatoj Eŭropaj kulpigas la Hispanan Popolofrontan Registaron, ke ĝi ellivera la landon al la »bolŝevismo«. Ili propriĝas al si la rajton, nomi sin liberintoj de Eŭropo antaŭ la anarĥio; sed iliaj efektivaj celoj kuŝas malproksimen de tiu, kiun ili prezentas en sia propogando.

Sub la preteksto de liberigo de Eŭropo antaŭ la minacanta anarĥio, klopodas la Eŭropa faŝismo siajn interveno - intencojn ĝeneraligi. La skemo, kiun ĝi ĉe tio sekvas estas eksterordinare egalforma. La hispana ministro de eksterlandaj aferoj Alvarez del Vayo, siatempe atentigis pri la taktiko de Romo kaj Berlino. Ĉiu lando, diris Alvarez del Vayo, havas sian propran Franco'n, kiu de Berlina kaj Romo kontraŭ sia propra patrujo estas uzata, por malfermi ĉiujn pordojn kaj pordegojn por la eksterlanda interveno.

La reprezentanto de plejmultvolo de iu ajn lando povas nomiĝi Azaña, Beneŝ, Van Zeeland, sed estas tamen kiel agento de landbolŝevigo prezentata. Kontraŭ Azaña estis Franco starigita, kontraŭ Beneŝ oni starigas Heinlein,

kontraŭ Van Zeeland tiras Degrelle, Svislandon disponigas la vico de malgrandaj Franco'j, Nederlandon perfidas malkaŝe Mussert, en Aŭstrio en Danublandoj, en Dancig'o kaj en landoj norde de Germanujo ĉie estas la sama ĵonglaĵo, kiu en Hispanujo tiel bone sukcesis, kun ĉiuj fortoj priparita. La Franco'j en la malgrandaj landoj Eŭropaj ricevas monon, armilojn kaj ordonojn por konstrui unu »nacian movadon». Post Hispanujo venas Ĉeĥoslovakujo, Aŭstrio, Belglando, la malgrandaj Danubŝtatoj, Elzacio........

Sed, la ĵonglaĵon de eŭropaj faŝistaj landoj, la »minacanta bolŝevismo», la »savanta nacia movado»por kontraŭstari en ĉiu malgranda lando, ne ĉiam povas sukcesi. Ĉar tiuj kiuj asertas, defendi la nacian movadon,en realeco transliveras la landon al fremda entrudulo; tiuj, kiuj estis pro »bolŝevigo» kulpigitaj, agas en kadro de respublika kaj demokrata rajto, kiujn ili kun la apogo de la plejmulto de popolo defendas, por savi la sendependecon de sia patrujo, la pravon kaj la ordon. En Ĉeĥoslovakujo puŝiĝas la intervenaj intencoj, kiuj malantaŭ Heinlein kaŝiĝas, al kontraŭstaro de Beneŝa eksterlanda politiko, kiu staras en la servo de kolektiva paco; en Hispanujo trovas la politiko de interveno sian kontraŭstaron en armita popolarmeo, kiu en heroaj bataloj staras kontraŭ la itala, germana kaj portugala entruduloj.

Estas tempo, ke ankaŭ la ceteraj Eŭropaj landoj pensu je la defendo de tiu eksterordinara »liberecakcio» de faŝistaj ŝtatoj.

Ĉar ne propogando, sed la agoj de tiuj landoj montras, al kiokondukas ilia ludo. Ne koncernas al simpatioferoj por la »naciaj movadoj» en aliaj landoj. Sed koncernas por tiuj; tiel nomitaj »naciaj movadoj», ŝanĝi en fajrujoj de internaciaj konfliktoj, kaj el tiuj konfliktoj eltiri eble la plej grandan profiton por la faŝista hegemonio kaj la detruo de libereco kaj demokratio en Eŭropo kaj eltiro de la lasta remparo kontraŭstaranta la mondmiliton. La sorto de Hispanujo por si interesas nek Germanujon nek Italujon; ĝi interesas ilin nur ĝis tiel, ke ili povas Franco'n uzi kontraŭ la okcidentaj demokratioj. Malplimulte estas Germanujo kaj Italujo interesiĝntaj en la sorto de Ĉeĥoslovakujo, ĝis kiam ili Heinlein'on elprofitas kiel pordiston por Danubaro. Pro kio Berlino denove serĉas en Belgujo la »nacian» liganon, estas la komentario tute malnecesa.

La eŭropa faŝismo konstruas en malgrandaj demokrataj landoj »naciajn movadojn», aŭ falsas la intencajn naciajn influojn en bastionoj kontraŭ la »anarĥio» kaj uzas ilin kiel atakkapron kontraŭ la tuta lando. Sur tiu vojo, la faŝismo esperas atingi la hegenomion en Eŭropo kaj vidi siajn koloniajn postulojn esti kontentigitaj.

Tio estas laŭ plana elkonstruo de strategiaj kaj politikaj pozicioj por la proksima mondmilito. La Franco'j en malgrandaj eŭropaj landoj servas kiel rimedo por tiu fincelo.

Prave oni diras, ke Madrido estas ne nur la tranĉeo de Eŭropa libereco kaj demokratio, sed ankaŭ la plej forta remparo kontraŭ la imperialistaj penoj de faŝistaj eŭropaj landoj kaj kontraŭ minacanta mondmilito.

---

## LA PROTESTANTOJ KAJ LA LOJALA HISPANUJO.

La protestanta pastro Henri Roser, agema pacifisto, direktoro de »Cahiers de la Reconcilation» (Kajeroj de la Reamikigo), komunikas al ni, kiel rezultaton de konscia enketo en Hispanujo, la jenan ateston, kiun ni plezure publikigas por la edifo de niaj amikoj, de la homoj havantaj simple penson lojalan kaj liberan.

»Mi venis al Hispanujo kun la celo porti al la protestantoj la ateston de la fidela amemo de iliaj samreligianoj el eksterlando. Mi sciis jam,ke diversaj , laikoj aŭ pastroj estis mortigitaj de la ribeluloj kaj tio estis al mi

konfirmita en Barcelono per la komuniko de personaj leteroj. Mi scias ankaŭ ke, decide senpolitikaj (sinodo okazinta en Valencio, petis al la du solaj pastroj aliĝintaj al unu partio, ke ili rifuziĝu, por ke ilia ministreco havu plenan sendependecon), la protestantaj eklezioj de Hispanujo estis tamen tre dankemaj al la Respubliko, tial ke por la unua fojo, ĝi rekonis al ili la veran liberecon de kulto kaj de la publika atestado. Sed mi ne estis malkontenta vidi de proksime la situacion al ili kreitan de post la komenco de la enlandana milito , en revolucia periodo.

Mi vidis, kaj sen ombro de hezito, mi povas aserti, ke neniu protestanto, de la registara flanko, suferis pro sia kredo, atakojn nek ĝenojn, kaj ke neniu religia konstruaĵo de la protestanta kulto suferis la plej malgrandan domaĝon.

Speciale la beletan preĝejon de Sankta Paŭlo en la strato Aragon mi vizitis en Barcelono; al ĝi mankis ne eĉ unu vitro. La pastroj de Barcelono kaj mi kredas esti vidinta ĉiujn, - deklaris al mi unuanime, ke ili ĉesigis propravole siajn publikajn servojn. Kial ? Simple pro prudenteco, kaj por ne doni kvankam senvole, al amaso por kiu la kristanismo konfuziĝas kun la pastra subpremado, la senton de provoko. Ili aldonis, ke dume, ilia ministrado estis daŭrigita sub la formo de la familiaj kunvenoj en la domoj; unu el ili, kiu estis denuncinta pro tio, de unu tre zorgema najbaro, estis objekto de esplordemandoj dum mi estis tie, post kio li ne estis plu ĝenata, kaj eĉ povis daŭrigi siajn kunvenojn en plena libereco.

Mi vizitis ankaŭ la centrojn de la protestanta evangeliigo en Aragono. La protestanta pastro, kiu pasigis tie sen malfacilaĵoj la du unuajn monatojn de la enlanda milito, iris al Francujo nur pro la sano de sia edzino. La evangelianoj estis tie kaj mi estis la atestanto pri la ĝenteleco de la anarĥista deligito pri la sekureco, kiun antaŭ mi li certigis al unu el tiuj evangelianoj, ke oni faros la eblon por ke oni ne konfisku la salonon de la religiaj kunvenoj. Rilate al la alia, li estu rajtigita remalfermi en plena zono de la armeoj sian protestantan lernejon.

En Valencio, kie mi vidis ankaŭ la protestantajn pastrojn, mi sciis per ili, ke ili daŭrigis siajn publikajn servojn plene libere kaj pace ĉiu Dimanĉe. Mi scias, ke hodiaŭ ankoraŭ okazas same eĉ en Madrido, la martira urbo.

Por fini ĉi tiujn mallongajn notojn, esprimantajn tion kion mi rekte vidis kaj aŭdis, mi volonte asertas la veron, ke ne ekzistas ia persukutado kontraŭ religio en la flanko de Registaro rilate al la protestantoj, kaj ke male ili estas traktataj tute respekte pri iliaj personoj kaj kredo. Mi aldonas, ke mi estas konvinkinta, ke absolute ne ekzistas prireligia persekutado por iu ajn, eĉ se senkulpaj katolikoj estis frapataj per maljusta maniero, kiun ne nur klopodis pravigi, en la unua momento de la popola kolero provokita de la perfido de unu tro granda parto de la Roma eklezio».

---

## LA HISPANA KAMPARANO EN LA MILITO.

La spiriĝita partopreno de grandaj amasoj de kamparanaro en la batalo kontraŭ la faŝismo okazas ĉefe pro tio, ke la kamparano, se li defendas sian Respublikon de la Poplfronto, samtempe defendas sian posedaĵon, kiun donis al li la Respubliko de la Popola Fronto. La tero - dispartigo estis en Hispanujo la krianta malpravo. Ĉiu, eĉ la plej modesta agrarformo estis de grandbienposedantoj sabotita.

La granda parto de milicoj en la unuaj monatoj kaj nun la elkreskanta Respublika Popolarmeo konsistas grandparte de kamparanfiloj kaj eĉ diversaj oficiroj antaŭ kelkaj monatoj kondukis la plugilon. La kamparanoj per tio ne

nur alportas gravan parton en la venko, ke ili siajn filojn sendas al la fronto, sed ankaŭ ili batalas en la interlando por la venko. Ili faras ĉion, por provizi la trupojn kaj la malsanulejojn. Ili akceptas en la vilaĝojn la malfeliĉajn rifuĝintojn, kiuj pro germanaj bomboj kaj faŝista krueleco devis forkuri.

Kial partoprenas la hispana kamparano kun tia diligenteco en la batalo kontraŭ la faŝistaj trupoj de Franco ? Ni volas tion per kelkaj faktoj deklari kaj ĉe tio kalkuli je la situacio de Katalunujo.




La strukturo de Kataluna agrikulturo diferencas jam de generacioj de la ceteraj agrarterenoj hispanaj. La tero estis en Katalunujo, ĝis la eksplodo de faŝista ribelo perlaborita precipe de farmistoj, tiel nomitaj »Rabassaires«. Sed ilia materiala situacio estis egala al la malriĉaj kamparanoj kaj tagdungistoj en la cetera Hispanujo kaj ĉiu alia. La farmistoj devis unu trionon ĝis la duono de sia rikolto redoni al la bienposedanto sufiĉe liveri, tiam ekfunkciis tiel nomita »Morta farmo« - leĝo, kaj la tuta bieno kun morta kaj viva inventaro reiris al la bienposedanto. Krom tiuj nekompareblaj altaj farmoj ekzistis en diversaj regionoj ankaŭ abundega redono al la asocioj, kiuj havis la akviĝon de senakvaj terenoj en siaj manoj, kaj de farmistoj ofte forprenis unu kvaronon de ilia rikolto. Plue por la terkulturisto alvenis ankoraŭ la ekspluato de la interkomercistoj, kiuj havis la tutan merkaton en siaj manoj kaj la prezojn de agrarproduktoj tiel premis, ke la farmistoj ne ricevis la rekompencon eĉ de sia laboro kaj ofte la vendo de iliaj laborproduktoj ne kompensis.

La subpremo de faŝista ribelo fundamente ŝanĝis la situacion de farmistoj kaj kamparanoj en la respublikaj regionoj. Per la dekreto de la Agrarkulturministerejo de la 7ª de Oktobro 1936, estas la tuta tero de grandbienposedantoj, kiuj rekte aŭ nerekte partoprenis en la faŝista ribelo konfeskata. La tero estis por eterne donacante al la kamparanoj por kulturi. Neniu havas rajton koradi la teron de kamparanoj aŭ de ili postuli iun ajn renton aŭ farmon. La jarcent - malnovaj sopiroj de malriĉaj hispanaj kamparanoj, perlabori la teron en la posedon de siaj familioj, estis per tio efektiviĝinta. La pravo de kamparanoj; perlabori la teron en la posedon de iliaj familioj estis de Popolfronta Registaro garantiita. Komproneble al tiuj kamparanoj, kiuj deziras perlabori la teron kolektive, ne estas malpermesate fari tion. Ĉiuj komunikoj de faŝista gazetaro pri la devigaj kolektivigoj estas libere elpensitaj. Ankaŭ en la pakto inter U. G. T. (socialista) kaj C. N. T. (anarĥista) sindikatoj, estas; »Ni garantias la individuan perlaboron de la tero al ĉiuj kamparanoj, kiuj ne deziras la kolektevigon«.

Se estas necesaj pruvoj, por montri kiel aspektis la kamparanliberigo, kiun la Respubliko efektiviĝis sur la kampo, do tion montras la ciferojn pri la

rikolto kaj la semado en tiu ĉi jaro. En kelkaj regionoj de la Respubliko estis la semado, kontraŭ al la antaŭa jaro je 35 ĝis 40 % plialtigita. La surfaco por la sekalo konsistas de unu miliono 736,956 hektaroj, 6,04 % pli multe ol la surfaco de jaro 1936. La surfaco de la aveno plimultigas tiun de antaŭa jaro je 5,71 % kaj konsistas de 914,434 hektaroj.La oranĝo - rikolto de tiu ĉi jaro atingis en la respublikaj regionoj proksimume 18 milionojn funtocentojn, tio estas plimulto de 600,000 funtocentoj kontraŭ de pasinta jaro. La olivo - oleoproduktado en jaro 1936 konsistis de 4,5 funtocentoj. La olivrikolto pligrandigas tiun de antaŭa jaro je 25 %.

La hispana kamparano en la respublikaj regionoj estiĝis libera viro sur la libera tero. Sed ĉie, kie la fremdaj pagitaj soldatoj eniris, akompanas ilin la sangosuĉistoj, kapitalistoj, bienposedantoj, kiuj al la kamparanoj denove forprenas la teron kaj denove fariĝas ilin sklavojn. Pro tio apartenas al la Respubliko la tuta amo de la kamparanaro, pro tio ili estas pretaj fari ĉion por certigi la venkon de la Respubliko. Kial la hispana kamparanaro, ne defendu sian patrujon kontraŭ la entrudo de fremdaj faŝistaj trupoj, la lando kiu estis ilia kaj al ili apartenas la lando, kiu apartenis al iliaj praavoj, kiuj per sango kaj ŝvito de multaj generacioj sklavigitaj kamparanoj perlaboris.

(el »Spanien Informationen«).

---

EN LA »RUĜA INFERO«........

LA MINISTRO DE PUBLIKA INSTRUADO KAJ GENERALO MIAJA PAROLADAS AL LA ITALAJ KAPTITOJ.

»Filoj de la Itala popolo - diris komence Hernandez - filoj de Italujo, hodiaŭ kaptitaj de la Hispana Respubliko, kaptitoj de popolo, kiu ne ofendis, nek atakis vin, vi kiuj estis kaptitaj sur la batalkampo, kie ni, la Hispanoj, batalas por konkeri liberan vivon kaj la rajton de inda laboro, en tiu ĉi solena momento ni deziras al vi paroli.

Ni ĉiuj, kiuj estas la hispana popolo, kaj estas viktimoj de la fremda faŝismo, ni suferas la invadon de nia patrujo fare de soldatoj, kiel vi, venintaj el eksterlando por semi la ruinon sur nia tero, detrui niajn hejmojn kaj mortigi niajn virinojn kaj filojn, movataj per la sentoj de malamo de la homoj regantaj vian landon, homoj, kiuj, iginte vin viktimoj de sia malico, volas egale suferigi ĝin al ni.

Laboristoj el Italujo! Vi, filoj de la popolo, kian malamikecon, kian malamon vi povas senti kontraŭ la laboristo, kontraŭ la libera homo de nia Hispanujo ? Vi, kiuj en via patrujo vivadas la mizeran vivon,kiel tiun konitan de niaj laboristoj ĝis la tago, kiam pace ili esprimis en la laŭleĝaj elektoj, per frakasanta plimulto, sian deziron ŝanĝi la reĝimon, la sistemon, ne nur politikan, sed ankaŭ socian, por certigi al si labore la panon morgaŭan; vi, kiuj en Italujo vivadis, mi ripetas, mizeran vivon, vi, soldatoj de Italujo, kial vi venis ataki nin, sur nia tero, en nia patrujo, pro la sola motivo, ke ni volas plibonigi niajn kondiĉojn de laborema vivo?

Mi perfekte komprenas, ke vi , italoj, amas vian patrujon, kiel ni amas nian. Kial, do, filoj de la popolo de Italujo, vi akceptis veni batali kontraŭ nin, ekster via patrolando?

Komprenu bone la karakteron de nia batalo. Ni, hispanoj, kondutas en tiu ĉi momento egale, kiel vi farus morgaŭ, se kiu ajn fremda lando provus sklavigi vin intervenante en la internaj aferoj de via lando. Kion vi farus en tiu ĉi okazo? Ekzakte la samon kiel ni. Estas tial ke ni volas resti libera popolo, ke ni interbuĉas nin. Oni fortrenis vin el viaj hejmoj por pereigi vin sur la arda hispana tero, kaj ne por kovri vin per gloro, ĉar ne ekzistas malhonoro pli granda, ol kontribui al la sklaveco de popolo.



GENERALO MIAJA, LA HEROA DEFENDANTO DE MADRIDO.

Mi parolis kun iuj el vi kaj ĉiuj akordiĝis por diri, ke ili ne sciis, ke ili forveturas por batali en Hispanujo. Kelkaj diris ankaŭ al mi, ke ili estis la objekto de speciala propagando intencanta prezenti la Hispanan Respublikon, la filojn de la Hispana popolo, kiel bandojn de rabistoj, kiujn vi devas ekstermi.

Sciu ĝin en bona okazo! Unu el viaj samlandanoj reprezentas en via patrolando gloran tradicion, ĉar li sciis batali por via libereco: li estas Garibaldi. Neniu Garibaldi'a stimulo vin gvidas, kiu povas vin kovri per gloro, sed male. Ne fariĝu murdantoj de la Hispana popolo, tiu popolo plena je deziroj de libereco kaj de progreso, ĉar krom perdi la vivon, vi malhonorus la memoron pri Garibaldi.

Kial batalas nune nia popolo? Kiel vi en Italujo, ni devis eluzi ĉiujn niajn energiojn en la fabrikoj, la laborejoj kaj la kampoj, ne havante malgraŭ tio la eblecon home vivi, estante traktataj pli kiel sklavoj, ol kiel homoj, vivante vivon, kiu malhelpis al ni la instruadon kaj faris el la analfabetismo la heredaĵon de la laborantoj, dum aro da posedantoj ĝuis je nia klopodo. Ni batalis kaj daŭrigas batalante por ke la laboristo plene ĝuu la frukton de sia laboro; por ke la intelektuloj povu libere pensi; por ke la kamparano laboru la teron por si kaj ne por sia sinjoro; ni batalas, fine, por doni al nia lando reĝimon de egaleco, en kiu la laboranto havu la rajton manĝi, en kiu la nenionproduktanto ne povu vivi el la klopodo de la aliaj.

Ni batalas por tute malaperigi la tragedian problemon de la laboristo sen laboro, por fini unu fojon por ĉiam la devigan senlaborecon kaj antaŭ ĉio por malhelpi, ke la faŝismo, kiu estas organizanta mondan militon, verŝigu sangolarmojn de viaj edzinoj, de viaj filoj, de viaj gepatroj, ĉar vi, fratoj el Italujo, vi estus la unuaj ĵetitaj en la inferan fulmotondron. Da profito por vi ne estas. Via ofero profitas nur al kelkaj potenculoj, inter kiuj figuras tiuj de la itala faŝismo.

La Respubliko respondecas pri via vivo, kaj kiam morgaŭ vi povos eniri en vian vilaĝon apud viaj amataj estaĵoj, vi diros al ili, ke la ruĝuloj, la "barbaroj", la "sovaĝuloj", kiaj ni, nomis vin fratoj, malfermis al vi siajn brakojn sangumitajn per la armiloj, kiujn oni igis vin preni kontraŭ ilin.

Vi diros al ili, ke sub la direktado de la leĝa registaro kaj de ĝiaj kuraĝaj generaloj, ni batalas kun fervoro por definitive establi reĝimon de egalrajteco kaj de justeco, por prezenti al la tuta mondo la ekzemplon de unu libera Hispanujo, kiu venkinte en la plej kruela milito, kiun registris Historio, formos la plej fortikan remparon de la paco. Vi diros ĉion ĉi ĉe vi, vi diros tion de ĉi tie mem, de nun, kaj ni donos al vi ĉiujn facilaĵojn por tion fari, por ke viaj familianoj sciu, ke vi estas tute sanaj, ke vi estis akceptitaj kaj protektitaj de popolo tiel inda kaj heroa, ke estas super la sango de ĝiaj mortintoj, kie flirtas la standardo ne nur de ĝia libereco, sed ankaŭ de la libereco de la mondo. Kiel ni triumfe portis niajn flagojn sur la kampojn de Guadalajara, ni portos ilin sur ĉiujn limojn de nia lando, ĉar ili reprezentas vian

Garibaldi'an tradicion, starigite per la afero de viaj plej bonaj homoj kaj estas la standardoj de la paco radiante super la mondo. Atestu do, al Mussolini, la nesubpremeblan volon de la Hispana popolo."

La defendanto de Madrido generalo Miaja, aldonis de sia flanko kelkajn vortojn ne malpli patetikajn;

"Italaj soldatoj - diris li -, klasfratoj, subpremataj laboristoj el Italujo, ni, kiuj estas la veraj hispanaj batalantaj por unu Hispanujo feliĉa kaj libera, sen klasoj, ni igis vin kaptitoj kaj ni traktas vin kiel fratojn, ĉar ni scias, ke vi estis perforte ĵetitaj kontraŭ nin; vi povis vidi, kiel viaj divizioj estis detruitaj per la heroeco de niaj soldatoj. La traktado, kiun vi ricevis, pruvas al la kanajleco de tiuj, kiuj prezentas nin al viaj okuloj, kiel murdistojn ebriajn de buĉado. Se, batalante kun ni, vi estus falintajen la manojn de niaj malamikoj, kiuj ne hezitas enkonduki en sian patrujon fremdajn armeojn, neankaŭ hezitas masakri niajn laboristojn. Kaj la perfiduloj estas ili.

Ni gajnos la militon, ni devas ĝin gajni, por alporti al la tuta mondo laboron, kaj ne nur al Hispanujo, epokon de justeco, de paco kaj de justeco, de paco kaj de progreso.

---

"Mi estas, diris unu el ili, tuta konforma kun tio, kion diris Sinjoroj Ministro kaj Generalo. Mi ne havas la kulturon necesan por esprimi min kiel decus; mi estas laboristo, mi ne havis teron por prilabori; mi estis ministo senlabora. Mi estis devigita de la registaro min enskribi; ni kredis, ke ni iras labori al Abisenujo. Mi estas preta diri ĉion, kion mi scias. Malfermu al mi mian koron kaj vi povos juĝi pri mia sincereco".

Alia soldato prenis siavice la parolon.

"Multenombraj Italoj sen pano petis, ke ili pretas foriri al Abisenujo. Estis kiam ni elŝipiĝis ĉe Cadiz, ke ni sciis, ke ni troviĝas en Hispanujo. En Siviljo oni donis al ni la armilojn. Ni ne volis batali kontraŭ niajn Hispanajn fratojn. Ĉiuj soldatoj estis italaj. Kiel kaptitoj ni estas bone traktitaj".

Unu tria deklaris: "Mi nur volas diri du vortojn por nin pravigi: En Italujo mi mortis pro malsato; estas pro tio, ke mi registris min por Abisenujo. La italaj oficiroj malkonfidis pri ni kaj ŝlosis nin en unu domo dum ili malaperis. Mia patro restis sen laboro dum multaj monatoj. Ĉie, kien li iris, oni petis de li la karton, de la faŝista partio. Ĉar li ne havis ĝin, oni rifuzis al li ĉian laboron. Fine li mortis pro ftizo. Mi sciis, ke mi estas en Hispanujo alvenante al Cadiz. Mi batalis en Sierra kaj en la Guadalajara - sektoro."

---

## LA MOBILIZO EN KATALUNUJO.

Samtempe kun la envoko de la jarkolektoj; 32, 33, 34, 35, 36, sekvadas la milit - ekzerca kriado de defendkapabla vira loĝantaro. De post, la laboristoj de "General Motors" antaŭ kelkaj semajnoj donis jam la ekzemplon, estas la a - b - c - de milita ekzercado ĉie instruata. Intertempe oni jam envenis en pli altan fazon de ekzercado. Sub la gvidado de Defendkonsilantaro kaj la" Kataluna Komitato por la Popolarmeo", estas ĉefe zorgate por la ekzercigo de la junularo. Ĉe tio oni donas grandan atenton por la defendsporto. La 21an de Marto estis la unua ekzercmilita - kampo instalita, kaj baldaŭ sekvos dudek similaj. En tiuj kampoj estas unue 2000 junuloj en aĝo de 18 - 20 jaroj, kiuj ankoraŭ ne estas envokitaj por la militservo, instruitaj por infanterio. Ĉe la malfermo de la kampo estis granda manovro prezentita, kie estis montrita la atako kaj la defendo de tranĉeoj. La ekzercigo en tiuj kampoj ĉirkaŭas la tutan teknikon,

kiu por la infanteristoj estas necesa en la moderna milito.
La "Kataluna Komitato por la Popolarmeo", kiu gvidas la disvastigan propogandon por la regula armeo kaj por la milito, okupiĝas ankaŭ pri la militekzerciĝo de la civila loĝantaro sub la gvidado de militistaj instruistoj. Krom tio, ekzistas unu "Sekretariejo" por la instruado de la pasiva aerdefendo kaj aliaj pasivaj rimedoj por defendo de civilloĝantaro.
La mobilizfarado en Katalunujo efikis en kelkaj semajnoj la rapidegan movadon. Ĉiuj kontraŭfaŝistaj organizaĵoj, sen escepto, koncentriĝis ĉiujn siajn fortojn por, kiel eble plej rapide pripari grandajn amasojn de instruitaj fortoj por la fronto.

---

## LA VOĈOJ EL LA BATALANTA HISPANUJO.

### Generalo Miaja la defendanto de Madrido.

-"Ni estas sur la vojo krei unu armeon, kiu elvokos la admiron de la tuta mondo. En ĝi regos la disciplino, abnegacio, oferpreteco. La Respubliko povas esti fiera pro sia armeo. La estonteco de la milito estas tute klara; ni gajnos ĝin. Ni havas ĉiujn por tio necesajn rimedojn. La laboristoj scias, ke ili per sia batalo ne nur sian patrujon kaj sian vivon defendas, sed ankaŭ la vivon de homoj el aliaj nacioj. Post la venko ni ĝojos en paco, libereco kaj bonfartò".

### Garcia Oliver, Juĝejministro de la Respubliko.

- "Ni akiris en la Guadalajara - montaro la veran militistan venkon super la eksterlanda, teknike bone ekipita diviziono. Kvankam ni perdis Malago'n, ni povas nian finvenkon esti certaj. La hispana popolo konvinkis ne nur sin mem pri sia propra forto; ĝi montris ankaŭ al la mondo, ke la "nesuperventa" militista potenco Itala estas unu mito. La pli alta moralo kaj idealo de niaj trupoj malebligos la barbaran konkir - kaj detruovolon de invadistoj".

### Jesus Hernandez, la Ministro de Instruado.

- "Mi kredas, ke la milito nun kun siaj ĉiuj kruelaĵoj komencas. La eksterlandaj trupoj venis en spirito de konkiro, ili kredas nin povi venkobati. Sed Hispanujo ne estas Abesinujo kaj Madrido ne estas Addis- Abeba".

### Komendanto Lister, Madrido.

-"Ni ne perdu pro tiu venko nian kapon ! Mussolini sentas sin nevenkita, por li estas la honordemando konkiri Hispanujon".

### Jose Diaz, Ĝeneralsekretario de Komunista Partio Hispana.

- "En la demokrata Respubliko kaj sur la tero de la Popolfronta Registaro povas esti la celoj akiritaj, por kiuj ni penas; tio estas unue, venki la militon kaj poste krei la politikaj kaj ekonomiaj kondiĉoj por la rekonstruo de la lando por bono de la popolo.... Ni estas en la demokrata Respubliko novaj tipoj, ne la anstataŭantoj de iaj ajn tendencojn, kiuj al si tiras la skismon de la Popola Fronto. Ne ekzistas alia ebleco - kaj tion oni diras en Madrido, Valencio kaj en Katalunujo -, kiel tiu Registaro de Popolfronto.... Je la 18ª de Julio ni batalis en la lando kontraŭ la ribelintoj: sed hodiaŭ ni devas batali kontraŭ la entruduloj el ekstere. Kontraŭ ili la Popolfronto, kontraŭ ili la Registaro de Popola Fronto !

Nº. 11.

Unu kaptita Itala soldato.

- »Ni ne estas malkuraĝuloj; sed ni estis forkurintaj, ĉar vi havas rajton, ĉar via afero estas prava, ĉarni, kontraŭ nia propra volo, estiĝis entrudulo j kaj kkonkerintoj. Ni estis forkurintaj, ĉar ni estas kunligitaj kun la Hispana Popolo - kaj pro tio ni transkuris al vi«.

---

LA KULTUR - NOTO EL HISPANUJO.

Por la konstruo de novaj lernejoj la Hispana Registaro rezervis 50 milionoj da pesetoj. Dekkvar milionoj da pesetoj estas konservitaj je dispono de lernejmaterialo; Nur por kontraŭbatali la analfabetismon estis dek milionoj da pesetoj en la ŝtatbudĝeto enkalkulitaj.

---

Por la jaro 1937estis la Ministrejo de Instruado kaj Belartoj je 496 milionoj da pesetoj provizita. Tiu estas la egala sumo, kiun oni disponigis por la Militministrejo. La sekvantan komparon meritas la budĝeto de Ministrejo de Internaj Aferoj, por kiu estis disponigite 296 milionoj da pesetoj. Por la kulturaj celoj estas do la egala sumo kiel por la armado, kaj la duoble pli multe ol tiu de la internaj celoj de la lando.

---

En Barcelono estis kun la helpo de »Generalitat« (Kataluna Registaro) la »Domo de Kulturo« efektevigita, kie proksimume 80 sciencaj institutoj, societoj, kulturaj kaj artistaj asocioj estas kunligitaj. Ankaŭ la Barcelona Universitato partoprenas en la kultura tasko de »Domo de Kulturo«. Ĉiuj akiraĵoj de moderna kulturo kaj aliaj eblecoj estos pere la »Domo de Kulturo« al la vastaj amasoj kaj ankaŭ la superigo de la ĝenerala kulturscio kontribuita.

---

A T E N T O !

Pro diversaj malfervoraj ĉirkonstancoj ne estis por ni eble efektevigi la promesitan eldonon en Esperanto de gazeto »NOVA IBERIA«. Al ĉiuj, kiuj sendis al ni la monon aŭ la respondkuponoj ni resendos. Nuntempe oni povas aĉeti »NOVA IBERIA« nur en lingvoj Hispana, Kataluna, Franca kaj Angla.

---

R I M A R K O J !

Al ĉiuj, kiuj sendis al ni gazetoj, leteroj, eltranĉaĵoj k.t.p., ni tre dankas.

Ĉiuj estas petataj sendi al ni adresojn de ĵurnaloj kiuj estas pretaj represi niajn oficialajn komunikojn.

La Esperantistojn ni petas diskonigi niajn bultenojn kaj ilian enhavon publikigi en sia nacilingva gazetaro, sendante al ni unu ekzempleron.

Ĉiuj korespondaĵoj bonvolu turni al ; Comissariaat de Propaganda, Esperanto - Fako, 14, de Abril, 442, Barcelona, Hispanujo.

---